# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

**N° 201 JUNIO 1999**

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta* PIO X-*a, preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM




Nia Sinjorino de la Espero
Patronino de la Esperantistoj

# Sommaire/*Enhavo*


| | Pages/*Paĝoj* |
|---|---|
| Le mot du président - *La bileto de la prezidanto* | 3 |
| Prière - *Preĝo* | 5 |
| Protokoles - *Protokoloj* | 7 |
| Dans notre association -*En nia asocio* | 10 |
| *Prelego pri Ekumenismo* | 11 |
| Calendrier - *Kalendaro* | 19 |
| Annonces - *Anoncoj* | 20 |
| Boite aux lettres - *Leterkesto* | 20 |
| Appel - *Alvoko* | 21 |
| Abonnements - *Kotiztabelo* | 23 |


**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**


Expéditeur/:Ass. Cath. Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR


**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres


Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

Surkovrile

Kial la kredantoj de la verda popolo ne kunligu la tutan mondon per internacia konstanta preĝo-ĉeno por la paco tutmonda laù invito de Maria,la Patrino de Dio ?

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aù tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio <u>nepre antaù</u> la 20.a de septembro 99. Venonta bulteno aperos fine de septembro.

Finpresado la 03/07/1999

*FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO*

**Nro 201 Junio 1999**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )

CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN
Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS
Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON
Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON
7,Av. Salomon
59800 LILLE
Peranto IKUE:
S-ro M.COLLEU
95,Rue Victor Hugo
80440 BOVES
<u>Redakcio :</u>
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623,3022@Compuserve.com



# Le Mot du Président

Le Tour de la Terre accompli, il y a quelques mois,par le ballon Breitling Orbiter 3 mérite d'alimenter notre réflexion. C'est un exploit remarquable qui démontre qu'à l'époque des jets, l'homme est capable de se déplacer en suivant seulement les caprices des vents, intelligement utilisés.

Nous devons tout d'abord saluer le courage et la tenacité des deux aerostiers qui ont su se lancer dans une aventure que certains pouvaient juger téméraire.

Mais il faut bien se rendre compte que leur périple audacieux n'a été possible que grâce au grand nombre de techniciens de tout ordre, qui à terre,ont préparé, guidé et conseillé leur vol. Sans ceux-ci,qui,grâce à leur étude des vents et de la météo, ont su préparer,heure après heure, la route à suivre et l'altitude à adopter, le vol n'aurait sans doute été qu'un échec.

Cela démontre à l'évidence que les réussites humaines ne peuvent avoir lieu qu'avec l'aide de nombreux autres hommes,qui, souvent restent dans l'ombre, mais ont une part considérable dans le succès remporté.

Il en est de même , toutes proportions gardées, dans le mouvement espérantiste. Nous avons eu et avons encore nos pionniers, comme par exemple l'abbé Emile Peltier, notre fondateur. L'Histoire retient leurs noms, mais eux aussi n'ont réussi dans leur tâche que parce qu'ils étaient aidés et soutenus par les autres espérantistes, souvent restés dans l'ombre.

C'est parce que les mérites et le dévouement de ces gens modestes ,notamment dans les tâches de secrétariat et de préparation des congrès sont trop souvent méconnus, que je désire les souligner en souhaitant que nous prenions conscience de leur altruisme et de leur efficacité silencieuse et que nous leur exprimons notre gratitude.

# La Bileto de la Prezidanto

La Terrondiro farita antaù kelkaj monatoj pere de la balono Breitling Orbiter 3 meritas nutri nian pripenson. Tio estas rimarkinda heroaĵo,kiu atestas ,ke en la epoko de la ĵetflugmaŝinoj, la homo kapablas moviĝi nur uzante la ventokapricojn, inteligente uzitajn.

Ni unue devas saluti la kuraĝon kaj la persistemon de la du aerŝipanoj,kiuj scipovis ĵeti sin en aventuron,kiun kelkaj povus juĝi senpripensa.

Sed oni devas konstati ,ke ilia audaca rondiro eblis nur dank'al la multaj ĉiuspecaj teknikistoj,kiuj surtere preparis, gvidis, konsilis ilian flugon. Sen la personoj,kiuj,dank'al sia prognozo de la ventoj kaj vetero,preparis horon post horo la sekvendan vojiron kaj la taùgan altecon,la flugo sendube estus nur fiasko.

Tio evidentiĝas,ke la homaj sukcesoj povas okazi nur helpe de multaj aliaj homoj,kiuj ofte restas en la ombro sed tamen havas grandan parton en la atingita sukceso.

Samproporcie samokazas en la esperantista movado. Ni jam havis kaj ankoraù havas niajn pionirojn, kiel ekzemple Pastro Emile Peltier,nia fondinto. La Historio memorigas iliajn nomojn, sed ili ankaù sukcesis en sia agado nur ĉar ili estis helpataj kaj subtenataj de aliaj esperantistoj,ofte restitaj en la ombro.

Ĉar la meritoj kaj la sinofero de tiuj modestaj homoj, ĉefe en la sekretaria laboro aù kunlaboro de kongreslaboro estas tro ofte malkonata, mi deziras emfazi tion, dezirante, ke ni konsciu pri ilia altruismo kaj silenta efikeco kaj esprimi al ili nian plenan dankemon.



# PREĜO por la Hodiaùa Tago

Vivu la hodiaùan tagon; Dio donas ĝin al vi;
ĝi estas via; vivu ĝin en Li.
La morgaùa tago apartenas al Dio;ĝi ne apartenas al vi.
Ne prokrastu ĝis morgaù la hodiaùan zorgon.
Morgaù apartenas al Dio. Konfidu ĝin al Li.
La hodiaùa momento estas malforta ponteto:
se vi ŝarĝas ĝin per la hieraùa bedaùro kaj la morgaùa maltrankvilo, la ponteto ne plu eltenas kaj vi falas.
La pasinteco ? Dio pardonas ĝin.
La estonteco ? Dio donas ĝin.
Vivu la hodiaùan tagon en kunesto kun Li.
Kaj se taùgas,ke vi maltrankviliĝas por amata persono, rigardu tion en la lumo de la resurektita Kristo.


Preĝo trovita sur religiulino mortigita en Alĝerio la 10-a de novembro 1995.

## Por konservi la medion

1. Endanĝeriĝis, ho Sinjor',
la mond' kaj nia vivo.
Ni fuŝis la naturon per
malsaĝa hom-aktivo.
Adoris ni al la Progres',
kaj nun montriĝas ĝia prez':
veneno-produktivo.

2. Prudenton, fortojn donis Vi
por flegi vivo-spacon;
sed aĉe ekonomis ni
detruis ĝian pacon.
Ne ĉion fari, kion ni
ja povus fari ! - tio ĉi
haltigos la minacon.


3. Ne retro-iru la Kristan'
al forpasintaj normoj.
Ni, male, helpu kun elan'
pretigon de viv-formoj,
en kiuj venas al akord'
pretendoj homaj - Dia ord',
ja kvazaù roz' kaj dornoj.



4. Ho Dio, ne permesu, ke
ni lasu nin instigi
de profitem', aù jesu, ke
ĝi povu korojn ligi.
Por homa vivo - bona fart',
por la naturo - bona gard':
prov-ŝtono por praktiki !

5. La limojn de l'kreskad', Sinjor',
ni devas akre senti.
Necesas fantazio por
teknikon komplementi
per tute nova vivo-stil'
kaj ŝpari energiojn mil
kaj pri l'natur' atenti.

Nova pm. VATIKANO




6. La mondon Vi konfidis al
ni por ĝin home formi.
Ordonoj dek nin gvidas al
viglec' por ne plu dormi:
planate pri la estontec'
ni volas, Di', en ĉiu pec'
al Via vol' konformi.

(el Okumenisches Esperanto-Forum Nro 33 -1999
(el la germana tradukis A. Burkhardt,)



# Protokolo de la Generala Kunveno en Lourdes de la 2-a de Majo 1999

La kunveno okazis en la mateno de la dimanĉo,la 2-an de majo 1999. S-ro Bessière prezidis.

Pastro Bourdon kaj S-ino Vincent salutis la kongreson perletere.

La agadraporton aprobis 26 membroj; 1 sindetenis. La financan raporton aprobis 24 membroj; 3 sindetenis.

En la baloto por la renovigo de unu triono de la komitato voĉdonis 27 anoj. La kandidatoj ricevis la sekvantajn voĉojn kaj estis reelektitaj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| F-ino Chaney | 27 | S-ino Lafargue | 27 |
| S-ro Lafargue | 27 | F-ino Michel | 27 |

La venonta ĝenerala kunveno okazos en Parizo en 2000. La venonta kongreso okazos en la jaro 2001 en Lisieux.

S-ro Pons donis la lastajn informojn pri la libro "Dio parolas al siaj infanoj". La afero kontentige progresas.

# Protokolo de la Komitatkunveno de la 2-a de majo 1999.

La Komitatkunveno okazis en Lourdes. Ĉeestis : S-ro Bessière,F-ino Chaney, F-to Marmou,S-roj Colleu kaj Pons. Petis senkulpigon: P° Bourdon kaj s-ro Villeneuve.

La komitato ,post la ĵus okazinta baloto, restas la sama.

La dato de la ĝenerala kunveno en la jaro 2000 estos fiksita en oktobro.

La asocio reklamos en la revuo Franca Esperantisto por esti pli bone konata kaj por varbi novajn membrojn.

La venonta komitatkunveno okazos en Parizo la merkredon la 20-an de oktobro 1999.

## *PILGRIMO SUB GRIZPLUVA ĈIELO.*

Malgraù la strikto de kelkaj fervojistoj, ĉiuj partoprenantoj bonorde alvenis en la staciodomo de Lourdes, kie s-ro J.Morin kaj alia tiea samideanino bonvenigis ilin kaj gvidis ĝis la hotelo.

Pluvo ĉiam minacis sed feliĉe ne falis dum preĝado sur la krucvojo kaj la lumprocesio. Sed pro la pluvo ni partoprenis la procesion de la malsanuloj interne de la subtera baziliko.



Plej intensa momento estis la prelego de Pastro Girault pri ekumenismo. En tre klara stilo li prezentis la kialojn de la malunuiĝo de la kristanoj kaj la nuna situacio, kie en ĉiuj Eklezioj, oni konscias pri la neceso reveni, per la rimedoj, kiujn Dio volos, al unuiĝo. Post la prelego P° Girault afable respondis la demandojn kaj vigla diskutado okazis pri tiu grava nuntempa problemo.

Nia pilgrimo havis internacian etoson. S-ro Ruigrok el Nederlando plene partoprenis la programon kaj faris paroleton, en kiu li donis interesajn informojn pri sia lando kaj ties problemoj. Itala kaj brazilianina esperantistoj, kiuj pilgrimis en la kadro de itala grupo,eksciis pri ni kaj vizitis nin. Ili partoprenis en niaj diservoj kaj en niaj vesperkunvenoj, kie ili bele kantis por ĉies plezuro. Dimanĉe ni havis ĉe nia tagmanĝa tablo s-rojn Morin el Lourdes kaj Fourtané el Tarbes.

Lunde matene spite la pluvo la pilgrimantoj vizitis la tombon de Pastro Peltier kaj fervore preĝis rememorante la agadon kaj ekzemplon de nia fondinto.

Dum posttagmezo la ekskurso al Betharam kaj Pau okazis subpluvo. Ĉiuj estis kontentaj eniri la belegan Palacon, kie naskiĝis la reĝo Henriko IV. Tie oni admiris Gobelins'ajn kaj Flandrajn murtapiŝojn, artaĵojn kaj meblojn, antaù ol reveni al Lourdes por ĉeesti la adiaùan vesperon kaj poste rehejmiĝi. ( A.B)

# EN NIA ASOCIO

Novaj membroj 1999:
- S-ino HERVIER (Vienne)
- S-ro ANDA (Ardèche)

Bonvenon al la genovuloj.

Informo:

Reveninte de la katolika kongreso en Lourdes ,Marcel COLLEU havis infarkton. Nun li eliris el la kliniko sed devas sekvi kuracadon kaj iri iomete pli malrapide ol antaŭe. Li informas nin, ke la kotizo de IKUE, kun abono al Espero Katolika, kiu restis senŝanĝa dum multaj jaroj, estas nun ekde la 1-a de julio 1999 fiksita al 25 eŭroj, kiu, por ni francoj, samvaloras je 164 francaj frankoj.

(el letero de la 11-06.1999)






# Historio kaj nuntempa situacio de Ekumenismo

*Prelego de Pastro GIRAULT okaze de la esperantista pilgrimo en Lourdes (30-4 / 4-5-1999)*

1- la historio de la dispartiĝo kaj rekonstruado de la unuiĝo.
2. la bazaj principoj de ekumenismo
3. La nuntempa ekumena situacio
4. La spirita ekumenismo,fonto kaj apogilo de progresa irado.

## I: Dispartiĝo kaj rekonstruado de la unuiĝo.

Ni rigardu , kiamaniere okazis la diversaj krizoj, kiuj naskis rompiĝojn en la kristana Eklezio.

En la komenco oni predikis la saman evangelion al ĉiuj. La popoloj estis malsamaj, same kiel la kulturaj civilizacioj kaj la lingvoj. Tio, tutkompreneble, instigis la unuajn kristanojn malsame elpensi la eldiron de la Fido, kiel ankaŭ la esprimon de la preĝado, en la liturgio kaj finfine la organizadon de la komunumoj.

Dum la unuaj jarcentoj, la kristanoj kunvivis , sen tro da problemoj, kune, en la unueco kaj diverseco. Kaj tiam, laŭflue de la jarcentoj, en epoko kiam la komunikaj vojaĝoj estis malfacilaj, kaj la politikaj faktoroj ne ĉiam ebligis fratajn rilatojn, disolvanta fremdeco iom post iom, naskis rompiĝojn.

La gravaj problemoj komencis, kiam la ekleziestroj konstatis la ekaperon de pli kaj pli gravaj diferencoj inter la eklezioj disvastigitaj en

la tuta mondo, precipe en la maniero esprimi ĝian fidon. Do, koncilioj kondamnis ilin kiel heretikajn, kaj ekskomunikis la lokajn ekleziojn, kiuj propagandis ilin. La plej granda parto de tiaj "heretikaj" Eklezioj iom post iom malaperis; tamen, kelkaj plidaŭre ekzistis; kelkaj ankoraŭ prosperas nuntempe.

La rezulto -- kia ajn estas la bonvolo de iuj kaj aliaj -- estas la kompatinda spektaklo de Eklezioj dividitaj inter si, kontraŭdirantaj la signon de unueco, kiun la Kristo petegis por sia Eklezio en la fervora preĝo de sia parolado post la vespermanĝo: "Ili estu unu! " (Johano 17,21 kaj sekvantaj).

Du gravaj rompiĝoj ankoraŭ nuntempe supervivas:

- Tiu naskita en la XIa jarcento, inter katolika Okcidento kaj ortodoksa Oriento.
- Tiuj de la XVIa jarcento en Okcidento, kiuj kaŭzis la apartigon for de la katolika Eklezio de diversaj Eklezioj eliĝintaj de la Reformacio aŭ de la Anglikanismo.

La vorto "Ekumenismo" aperis ĉirkaŭ la jaroj 1920-21 kaj signas la klopodon de la kristanoj por labori al la starigo de unuiĝo inter siaj Eklezioj.

## II : - Bazaj principoj de Ekumenismo.

En tiu procezo de rekonstruado de la unueco, la Eklezioj ne ĉiam akordiĝis pri la koncepto mem de unueco, kiun ili deziris, kaj pri la maniero realigi ĝin.

Dum longtempe ĉiuj Eklezioj elpensis la unuecon nur pere de engluto en si mem de ĉiuj aliaj Eklezioj. "Reveno al la katolika Eklezio ! " ...Konvertigo al la Reformo ! ". Sed tio ne sukcesis.

Tute en la kontraŭa direkto, kelkaj Eklezioj opiniis, ke ne estis alia solvo ol konservi la nunan situacion, kaj ili konkludis : "Ni akceptu ke ni unuiĝu kiel ni estas ! " Sed tio estis solvo iom pigra kaj "triumfisma", ĉar ĉiu trovas sin "bona" kiel li estas !

Tria vidmaniero , kiu estas tiu de la ekumenismo, havas kiel elirpunkton la ideon, ke ĉiu Eklezio devas komenci per sia propra ekzameno por demandi sin, ĉu ĝi ne estas, en sia nuna stato , obstaklo al la unueco, pro manko da fideleco al la Evangelio, kion la abruptaj rimarkoj de la aliaj Eklezioj ebligas malkovri .

Oni povus esprimi tion alimaniere, dirante ke, nuntempe, ĉiu Eklezio komencu konfesi ke, samtempe ĝi posedas iun kvanton da valoroj, kiuj estas propraj al ĝi -- kaj kiujn ĝi nepre devas konservi -- sed ankaŭ ĝi heredis dum jarcentoj iun kvanton da malvirtoj -- kiujn ĝi devas korekti -- la fina celo ne estas alveni al tuta plena uniformeco, ĉar kelkaj malsimilaĵoj inter la Eklezioj ne nur estas akordigeblaj kun la komuneco, sed ankaŭ konsistas el gardeblaj riĉaĵoj.

La ortodoksa teologo Olivier Clément bone priskribis tion sur paĝo kies ekvilibron oni povas admiri, eĉ se li havas la kompreneblan reflekson doni avantaĝon al sia Eklezio. Mi citos ĝin en ĝia tutaĵo:

<< Se oni konsideras la tri historiajn branĉojn de la kristanismo -- la ortodoksa,la katolika kaj la protestanta -- oni malkovras inter ili kompleksan dialektikon kie ĉiu,laŭ iu punkto, ludas aksan rolon.

Per la tuta aperto de mia fido, skribis Olivier Clément, mi opinias ke la plej integreca akso estas la Ortodoksio, ĉar ĝi estas la spirita akso. Ortodoksio dividas kun Romo la senson de la Eklezia mistero, sed, kiel la Protestantoj, ĝi havas la sencon de la libereco en la Sankta Spirito. Tamen, ĝi ne oponas la profetismon al la

sakramenta starigo, ĝi enradikas ĝin, kondice ke ĝi purigu ĝin, ĉar la Spirito baziĝas sur la Krista korpo.

Ni rigardu nun la Reformon. Ĝi iusence konstituas la profetan akson de la Eklezio. La Reformantoj ne deziris frakasi la Okcidentan Eklezion. Ili deziris reformi ĝin. Forpuŝitaj -- ĉu ili ne povis fari , ĉar mankas la ortodoksa akso ? -- ili malfermis historian parentezon, kiu fermiĝos, kiam Romo, retrovante siajn orientajn radikojn, povos akcepti iliajn postulojn sen dissolvi la misteron de la Eklezio. Atendante, ili estas por Romo, kaj ankaù por la Ortodoksio, profeta pikilo, kiu malpermesas la neevoluon de la ritoj kaj de la mensoj.

Romo , fakte, estas la akso de la historia enkarniĝo de la Universala Eklezio. Ĝi sola povas malhelpi, ke la Protestanismo dissolviĝu en la historio kaj ke la Ortodoksio ŝtoniĝu ekster la historio. Sed ĝi bezonas la spiritan "ortodoksan" akson por integri la postulojn de la Reformacio sen fariĝi mem "protestanta" en la plej malforta senso de la vorto. Kaj la Ortodokcio bezonas ĝin por trovi spacon de enkarniĝo >>

Oni povus konkludi ke la antaùeniranta evoluo iras tra tri fazoj:

-konatiĝi reciproke pli bone,trans la nesciaĵoj kaj karikaturoj,

-akcepti la ekziston,kaj iusence,la misteron de la aliaj,

-malfermi sin al reciprokaj demandadoj.

## III : La nuntempa ekumena situacio.

La ekumena aperto, kiun ni estas vokataj travivi hodiaù,lumiĝas per la freŝdata historio.

La ekumena ondo komenciĝis kune kun kelkaj profetoj pri la unuiĝo,kiuj ebenigis la vojon, je la fino de la XIXa jarcento kaj la komenco de la XXa jc. Tri personoj: Lord Halifax,Sinjoro Portal kaj kardinalo Mercier el Loveno, organizis la unuajn paroladojn inter Anglikanoj kaj Katolikoj.



Poste alvenis tio, kion oni povus nomi la turnopunkto de la mezo de la XXa jc,kiam, en 1948, estis oficiale kreita la Ekumena Konsilio de la Eklezioj, kaj estis anoncita, en 1959 la dua Vatikana koncilio.

Ĉe la Ekumena Konsilio de la Eklezioj, oni povas konstati, ke la ĉefaj kunvenoj -- kiuj okazas ĉiujn sep aù ok jarojn -- iom post iom, kunligis ĉiujn kristanajn Ekleziojn, ekcepte kelkajn evangeliajn Ekleziojn, kaj la katolikan Eklezion. En decembro 1998, en Harare (Zimbavio,Afriko), la ekumena konsilio de la Eklezioj decidis estigi, se eble, en la jaro 2000 Forumon, kien oni invitos ĉiujn kristanajn Ekleziojn,samtempe kiel organizantojn kaj partoprenantojn.

"La koncilio arde deziras , ke la iniciatoj de la katolika Eklezio progresu, kune kun tiuj de la apartigitaj fratoj, sen meti iun ajn obstaklon al la agoj de la Providenco kaj sen prijuĝi la estontajn impulsojn de la Sankta Spirito. "(Nro 24)

Ni estas tie ...

Ĉu ni baldaù faros la lastan paŝon ?

Oni antaùvidas duoblan riskon. Tro rapide iri, tio riskas "frakasi" la Ekleziojn, se ĉiuj el ilia membroj ne estas pretaj. Sed,se, male, oni atendas ke ĉiuj estos deciditaj, oni prokrastos senfine la solvon.

Ni rigardu kiamaniere la afero konkrete staras en la rilatoj inter la katolika Eklezio kaj la aliaj Eklezioj. Por klare vidi tion, ni rigardu tiujn ĉi, unu post la alia, ĉar la situacioj estas tre malsimilaj.

1- Inter <u>Katolikismo kaj Ortodoksio</u>, oni povas

diri, ke finfine staras nenia malsimileco vere apartiganta.

Oni permesos al mi doni, tie, personan manifestiĝon. Mi diros ke, rilate tion, mi estis tre imponiĝita per interrilato kun Ortodoksa Patriarko Athenagoras, en Istanbulo, en 1967. Kiam mi demandis lin ĉu li opinias ke la unueco inter niaj du Eklezioj baldaŭ okazos, li ekkriis per fortaj frazoj, kiujn mi transkribis sur magnetofono, kun lia rideta aprobo. Li diris :

"Sed, kio apartigas nin ? Absolute nenio ! La sama Jesuo-Kristo, la sama Bapto, la sama Evangelio, la samaj martiroj, la samaj sanktuloj, la samaj tradicioj kaj historio dum 20 jarcentoj !

Ĉu estas io, kio apartigas nin ? Mia opinio, nenio, absolute ! "

Li aldonis:

"Estas kelkaj malsimilaĵoj,kiujn ni metis en la manojn de la teologoj, kaj mi estas tutcerta pri tio, ke ili trovos la rimedon por denove reunigi nin en la sama kaliko,en kiu ni trinkis dum la dek unuaj jarcentoj".

Restas ke la Ortodoksoj devos fari sian eblon por konsenti pri sia ligilo kun la Roma episkopo,agnoskante en tiu ĉi la prerogativojn, kiujn ĉiuj Eklezioj konsentis al li en la komenco.

Samtempe la Katolikoj devas konsenti ne-trudadi al la Ortodoksoj, ĉion kion la katolika Eklezio precizigis, precipe en la teologa fako, depost la apartigo en la XIa jc. Kaj korelative , la Ortodoksoj ne devas trudi la Katolikojn forlasi tiajn specialaĵojn. Tiel klarigis kardinalo Ratzinger en sia libro: "Principes de la théologie catholique", Téqui,1982, p.222).

2 Rilate al la katolika Eklezio kaj la Eklezioj alvenintaj el la Reformo, ili devas kune aŭskulti iliajn reciprokajn demandojn .



* La Protestantaj Eklezioj faras fundamentan kritikon al la katolikoj :

"Vi aldonis aferojn al la Evangelio (Dogmoj,devotaĵoj, ktp . ! ")

*La Katolika Eklezio, siaflanke, diras al la Protestantoj : " Ŝajnas al ni, ke revenante al la pureco de la Evangelio, vi neglektas esencajn partojn de la depono de la Revelacio ..."

Oni povus havi, kiel konkretan ekzemplon, la pozicion de ĉiu Eklezio rilate Maria : la Katolikoj inklinas aldoni privilegiojn kaj devotaĵojn ; la protestantoj male havas la reflekson nuligi privilegiojn kaj devotaĵojn.

Konkludo :ĉiu aŭskultu la demandon de la alia !

3- Kion diri rilate al la Anglikanoj ? Laŭ la kazoj, ili estas tre proksimaj de la katolika Eklezio aŭ pli malproksimaj.

Oni ja trovas en anglo-katolika flanko de Anglikanismo karakterizojn tre proksimajn al Katolikismo kaj Ortodoksio, kaj, oni trovas en la evangelia flanko la karakterizojn de la protestantoj. La Anglikana Eklezio mem konfirmas tion, difinante sin kiel "ponto" inter la du aliaj Ekleziaj tutaĵoj, ĉar ĝi samvalore akceptas ilin en sia sino.

La situacion de la Anglikanoj, oni devas analizi laŭ la angla "comprehensivness" kiu plilargiĝas senfine la horizonton !

## IV : Spirita Ekumenismo .

Tiuj diversaj rimarkoj estas nur tutsimpla esprimo de penso pri kiuj komencas akordiĝi la Eklezioj enŝoviĝintaj en la dialogon. Tio evidentiĝas, ke la teologo estas preta por antaŭeniri. Mankas nur io : la kuraĝo ekfari la unuajn paŝojn kaj realigi en ĉiu Eklezio la necesajn "konvertiĝojn", aŭskultante la demandoj

de la aliaj.

Paroli pri "konvertiĝo", tio estas eniri en la spiritan dimension de la ekumenismo, pri kiu Pastro Couturier esti profeto. Mi ŝatas finfini mian pensadon, citante Pastron Villain, kiu reprenis kaj popularigis la faman formulon de Pastro Couturier pri "la unueco kiun Kristo deziras, en la momento kaj per la rimedoj kiujn Li deziros".

"La sola favora etoso por Kristana Unueco, skribis Villain, povas esti nur tiu de la preĝado de Kristo (Joh.17) aŭ tiu de la agonio,kiu plidaŭrigis ĝin. La Koro de preĝanta Kristo, jen la vojkruco, kie la kristanoj devas daŭre renkonti sin reciproke. En la preĝado de Kristo, kiu valorigas ilian propran preĝadon, kuŝas farenda interŝanĝo: la Patro akceptas la preĝadon de mia apartigita frato, de kiu mia apartigita frato riĉiĝas. Je tiu nivelo, mia frato kaj mi deziras nur unu solan kaj saman aferon: la unueco kiun deziras Kristo en la momento kaj per la rimedoj , kiujn Li antaŭvidis. Ni ne kuraĝus prezenti al Li kombinaĵojn aŭ planojn, kvankam ni konservas nian Fidon sendifekta. Ni estas nur animoj malfermitaj antaŭ Li, en plena ricevado de Lia graco."

Ĉiuj kristanoj, skribis Pastro Couturier, alproksimiĝu al sia Sinjoro, Kristo, kun malfermita animo, atentemaj al la Dia alvoko, humile allasitaj en la sinteno de la humila Virgulino Maria; ŝi respondis al la anĝelo la "pratipan" vorton de kreatulo al sia kreanto: "Jen la servulino de la Sinjoro, estu farita al mi laŭ Lia parolo."

Tiunivele, la unueco de la Kristanoj ĉesas esti problemo por fariĝi mistero. Hodiaŭ, en Lourdes, spirita loko, ni estas tre bone lokitaj por eniri en tiun misteron.

René GIRAULT



# KALENDARO

| | |
|---|---|
| 17/07 ĝis 24/07 | SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomysl<br>18-a IKUE E-Tendaro Prezo : 400 FF. Oni dormas en 2-litaj bonkvaliataj tendoj.<br>Ĉiu tendara tago komenciĝos per esperantlingva Sankta Meso en tendara kapeleto. Por la tuta dusemajna restado pagos gejunuloj nur 400 FF (inkl.manĝoj), ( 500 FF por plenkreskuloj averaĝe) |
| 31/07 ĝis 07/08 | BERLINO (Germanio)<br>84-a Universala Kongreso de Esperanto<br>http://www.Esperanto.de/uk99 |
| 07/08 ĝis 14/08 | GLIWICE (Pollando)<br>14-a Ekumena Kongreso<br>52-a IKUE Kongreso<br>49-a KELI Kongreso<br>JET'99 (Junulara E° Tendaro) |
| 03/09 ĝis 07/09 | L'AQUILA (Abruzzo: Italio)<br>13-a Katolika Itala Esperantista Kongreso |

# ANONCOJ

## 01/ KOSOVO

Ekzistas Humanitara Organizo kiu helpas al sanigo de homa katastrofo en Kosovo pere de esperanto.
"Humanitara Organizo ESPERO
M. Spahe 10/II 71000 SARAJEVO -Bosnio
Pliaj detaloj vi povas peti al la redaktoro:
Basso Michel (adreso:vidu p.2)

## 02/ LABOR-GANTOJ ESPERANTO

Aperis labor-gantoj kun la vorto "Esperanto" .Ekzistas du variantoj:
-multkolora simpla bov-leda 15 FF + 8FF sendkostoj (Eŭropa Normo)
-tut-leda verda 20 FF+ 8 FF sendkostoj.
Ili taŭgas por konstruaj laboroj aŭ por la ĝardeno
Mendu ĉe: TAKE-ESPERANTO
90,Rue du Tiefenbach 68920 WINTZENHEIM
Menciu : Reklamo FKE201 , por ke la profito iru al nia asocio.

## LETERKESTO

El Rumanio
Estimataj gesamideanoj de la F.K.E,

*Ni estas IKUE-anoj ekde 1990 kaj ni deziras pilgrimi al Lourdes. Ni petas vin sendu por ni pliajn informojn kaj aliĝilojn.*
*Fuhasz Idisz , Fazakas Alexa kaj Konya Margareta el Oradea Rumanio*

<u>Red:</u> Via letero bone atingis min la 12.04.99 sed la aliĝilojn mi ne plu povis sendi al vi , ĉar la pilgrimo jam komencis la 30.4.99.



**I.K.U.E.** (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)

Alvoko al la gesamideanoj de la tuta mondo

Karaj Gesamideanoj,

okaze de la 20a Mitingo en Rimini (Italio) de la Asocio por la Amikeco inter la Popoloj ni starigos Esperanto-standon.

Tie ni intencas eksponi la respondojn al tutmonda enketo per Esperanto pri Jesuo Kristo.

Ĉiu homo povas respondi al kiu ajn religio li apartenas. Eĉ nekredanto rajtas respondi.

Ni invitas vin kuntreni ankaŭ neesperantistojn partopreni la enketon en sia nacia lingvo(ĉi-okaze bonvolu kunsendi la tradukon en Esperanton).

Al la unuaj cent respondontoj ni sendos filatelan bildkarton de la Respubliko Sanmarino. Pro tio skribu tre klare vian adreson!

La respondoj estu mallongaj: ne pli ol deko da linioj.

La skribaĵo estu sufiĉe klare legebla, ĉar ni devas traduki en la italan por la vizitontoj.

BONVOLU SENDI LA RESPONDILOJN ANTAŬ LA 31a DE JULIO 1999

AL IKUE ĈE GAMBUTI A.
Via Bellini 24
I-47039 SAVIGNANO SUL RUBICONE (Italio)

Ni ege dankas vin pro via afabla kunlaboro.

por IKUE

P.S. Ni kunsendas iom da enketiloj. Se bezonate vi povos fari fotokopiojn aŭ peti al nia adreso aliajn ekzemplerojn.


TURNU →

Monda enketo pri Jesuo Kristo

KIU ESTAS JESUO KRISTO
POR MI

Mia religio .................. Lando.................

Aĝo........... Profesio...............




Dum la Pilgrimo en LOURDES (Foto: Gambotti)

# Kotiztabelo 1999

| | Frankoj | Euroj |
|---|---|---|
| I.K.U.E kun "Espero Katolika" | 164 | 25,00 |
| Peranto : S-ro M. COLLEU<br>95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES<br>P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE . | | |
| A.C.F.E kun "Franca Katolika E-isto" unuopulo : | 60 | 9,15 |
| geedza paro : | 80 | 12,20 |
| gejunuloj ĝis 25-jara,pastro,religiu(in)o : | 30 | 4,57 |
| bonfaranto : | 200 | 30,50 |

Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 2eme trimestre 1999 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris
sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO